


Numero: 334.
Marto 2020.

28-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Marto

Ĉi jare ne estis vintro. Ĉe ni ne neĝis, eĉ apenaŭ frostis. Mi ne rememoras pri tia vintro. Infanaĝe ofre en marto degelis la neĝo. Tiutempe ni jam malpacience atendis la printempon.

Marto por mi estas tre kara monato. La naturo renaskiĝos, ekaperos la unuaj floroj, la neĝborulo kaj aliaj.

En ĉi monato ankaŭ mia korpo kaj animo renoviĝas, mi sentas novan forton kaj esperon.

Estus bone, se printempe ankaŭ ĉio ŝanĝiĝus kaj de sur nia terglobo malaperus la malamo. La homoj diversnaciaj povus vivi unu kun la alia pace kaj harmonie. El la koroj forflugus la miskomprenoj kaj ni trovus la komunan lingvon.

Esperanto estis kreita por ke ni komprenu unu la alian.

La koron de doktoro Zamenhof dolorigis la malamo kaj la miskomprenoj de la homoj.

Ili ofte militis, ĉar ili ne komprenis la lingvon de la alia homo. Pro tio ili insultigis kaj ili prenis armilojn por serĉi la justecon.

Multfoje estus sufiĉa, se oni parolus fremdajn lingvojn. Sed kiu estas kababla ellerni multe da lingvoj. La homa vivo estas tro mallonga. Krome la lernado de iu lingvo estas mem la scienco.

Ĉefe nun pere de interreto nin inundas milionoj da informoj. Nia kapo estas sarĉita per ili tage kaj nokte.

Se Esperanto estus nia dua lingvo, tiam almenaŭ helpe de la lingvolernado ni povus ŝpari iom da tempo kaj energio.

Mi tre esperas, en iu tago la homaro vere rekonas la utilojn de Esperanto kaj ni ĉiuj klopodos disvastigi ĝin sur la terglobo.

Estu nia grava tasko disvastigi Esperanton, kiel printempe la kamparano semas kaj semas por ke el la etaj semoj eliĝu belega kaj valora keskaĵo.

— Redaktanto —



Fabelo

Kaj estis kaj ne estis, trans la Fabeloceano vivis juna reĝo. En iu tago li decidis, ke ellernos ĉiom da lingvoj parolataj sur Tero.

Li tuj alvokis famajn lingvoinstruistojn, gramatikistojn kaj lingvofakulojn kaj li diris al ili:

— Mi volas ellerni ĉiom da lingvoj parolataj sur Tero. Via tasko estos instrui min pri tiuj ĉi lingvoj. Se vi ne povos instrui min, tiam mi senkapigos vin.

La lingvoinstruistoj, gramatikistoj kaj lingvofakuloj ege ektimis. Ili preferis scii sian kapon sur sia kolo, ol en la korbo.

Ili serĉis pretekstojn:

— Mia reĝa Moŝto, mi jam estas tro maljuna por instrui vin — diris la lingvoinstruisto.

— Mi malsaniĝis je kormalsano — mensogis la gramatikisto. — Mi ne povas helpi al vi.

— Mi jam estas tro maljuna por instrui lingvojn — rifuĝis la lingvofakulo.

La reĝo restis sen instruistoj. Li furiozis, blasfemadis, sed vane. En la fortikaĵo ne estis homo, kiu instruus al li lingvojn.

Jam vesperiĝis, kiam ekaperis junulo okulvitra. Onidire li venis el la malproksima Pollando, el la urbo Bialistoko. En lia mano estis kajereto kaj li transdonis al la reĝo.

— Kio ĝi estas? — demandis la reĝo mire.

— Mia reĝa Moŝto el tiu kajereto vi povos ellerni lingvon eĉ memstare, kaj se vi ellernos ĝin, en la tuta mondo vi povos komprenigi vin.

La okuloj de la reĝo ekbrilis kaj li tuj komencis lerni Esperanton.

Jen la fin', eta porkido portu ĝin! Kiu ne kredas, tiu rakontu pli bonan fabeleton!

— Ŝaŝa —



Vojaĝo al la lando de la misteroj

— dua ĉapitro —

Mi rigardis supren. Unue mi ne vidis la bluan birdeton. Pro tio Elinjo ege miris:

— Ĉu vi ne vidas ĝin? Ja, ĝi sidas sur la branĉo de la arbo tute proksime, ĝuste super via kapo.

Mi denove suprenrigardis kaj tiam ankaŭ mi ekvidis la bluan birdeton.

Efektive ĝi estis tre stranga. Ĝi ne forflugis, eĉ ĝi venis al ni pli proksimen.



— Kion deziras de ni tiu ĉi birdeto? — mi demandis Elinjon, kiu ĵetis al mi miran rigardon, kvazaŭ ŝi estus demandante:

— Ĉu vi ne scias? Ĉu vi ne sentas? Io estas en la aero. Mi ne scia, kio ĝi estas, sed tiu io ege pulsadis mian koron.

Tiam jam ankaŭ mi sentis la pulsadon en mia brusto. Ĝi estis agrabla, ĉiela sento. En mia korpo trakuris malforta tremeto, kiel la printempa vento karesadas la apenaŭ eligantajn foliojn sur la branĉoj de la arboj.

Mi rigardis al Elinjo kaj mi ne povis ekparoli. Mi nur staris mute kaj mi levis miajn okulojn al Elinjo, kie al la blua birdeto.



Ĝi sidis tie senmove. Ŝajnis al mi, ke tiu birdo rigardas nin. Kvazaŭ ĝi volus diri ion. Eble ĝi parolis, sed ni ne komprenas la birdan lingvon. Ĉu Elinjo komprenis, tion mi ne sciis? Kiam mi rigardis al ŝi, mi vidis strangajn lumojn en ili.

Elinjo mire demandis min:

— Ĉu vi ne komprenas?

— Kion mi devus kompreni?

— Ĉi tiu estas la blua birdo de l' amo. Ni trovis ĝin sur tiu ĉi stranga insulo.

Mi denove rigardis al la birdo. Mi jam aŭdis pri ĝi, sed ĝis nun mi pensis, ke tia birdo ne ekzistas. Ĝi estas nur elcerbaĵo aŭ ĝi ekzistas en la fabelo. Antaŭ kelkaj jaroj mi vidis pri ĝi belegan filmon. La filmo temis pri la romanco de junulo kaj junulino. Ankaŭ en la filmo estis blua birdo de l' amo.



— Ĉu vi serioze kredas tiun ĉi historion? — mi demandis Elinjon. Eble ĝi estas nur fabelo. Kiel vi opinias pri tio?

Elinjo longe silentis. Fine ŝi elbuŝigis laŭte:

— Kredi amon estas serioza afero. Kiu ne kredas ĝin, tiu ne konas la veran amon. La sincera amo superas ĉion. Ĝi ĉarmas la vivon kaj ĝi donas eksterordinaran feliĉon al la geamantoj.

Mi restis muta kaj mi diris nenion, sed en mia animo mi konsentis kun Elinjo. Certe mia kunulino pravas kaj ŝi bone vidas tiun ĉi demandon.

Ni devis iri plu, ĉar antaŭ ni ankoraŭ estis longa vojo. Post iom da tempo mi instigis Elinjon:

— Ni iru!

— Ĉu vi deziras lasi tie ĉi la bluan birdon de l' amo? — ŝi demandis surprizinte kaj mi vidis, ke ankoraŭ ŝi volas resti.

— Baldaŭe ni devos reiri al la ŝipo — mi provis konvinki ŝin. — Eble jam niaj ŝipkunuloj estas sur la ŝipo.

— Kio okazis, se ankaŭ ili renkontis la bluan birdon de l' amo? Eble sur la insulo estas ankaŭ aliaj birdoj. Ĝi estas la insulo de la bluj birdoj. De tie ili flugas al la landoj, kie estas geamantoj.

Mi ne sciis, kion respondi? Mi sentis Elinjo volas resti tie ĉi?

Mi estis konfuzite. Belega junulino estas kun mi sur tiu ĉi stranga insulo.

Mi rigardis ŝin pli detale. Ŝiaj longa, blonda hararo kun la bluj okuloj, la perfekta korpo vekis en mi la fajron.

Eble tiu ĉi blua birdo ne estas hazarde sur la branĉo kaj ni estas la elektitoj. En mia vibo nun komenciĝos nova epoko.

— Daŭrigota —

Poezio

Julio Baghy

Estas mi esperantisto

Verda stelo sur la brusto
iom palas pro la rusto.
Mi ne estas purigisto;
estas mi esperantisto.

Kuŝas ie sub tegmento
"Netuŝebla Fundamento".
Tuŝu ĝin nur la Mefisto;
estas mi esperantisto.

Polvkovrite sur bretaro
putras mia SAT-vortaro.
Tedas min la vorto-listo;
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas
kaj gazeton ne abonas...
Librojn legu la verkisto;
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:
"Bonan tagon! Ĝis revido!"
Ĝi sufiĉas por ekzisto;
estas mi esperantisto.

Pionirojn mi kritikas,
la gvidantojn dorne pikas
kaj konspiras kun persisto;
estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,
sed neniom mi ofertas.
Mi ne estas ja bankisto;
estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo
la movado, organizo,
helpas mi nur per rezisto;
estas mi esperantisto.

Flugas per facila vento
el la buŝo Nova Sento.
Ĝi sufiĉas por sofisto;
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia
staros "rondo familia",
nekrologos ĵurnalisto:
estis li esperantisto.

Julio Baghy

Siberia lulkanto

Hirte flirte flugas haroj,
siblas vintra vent'...
Morde torde ŝiras koron
larmoj kaj la sent'...
Kant' patrina plore sonas,
dormas filo en lulil'...
Noktripozon por li donas
sono' infana en trankvil'...
"Baju, baju, bajuŝki...
Dormu sonĝe, dormu vi...
Ĝemo, ploro kaj dolor'
flugu for de via kor'!
Baju... baju... bajuŝki...
Dormu filo, dormu vi!"

Brue skue blekas vento,
knaras ligna dom'...
Ĝeme treme sin forkaŝas
besto kaj la hom'...
Vent' alportas sangan krion
tra l' glacia neĝa val'...
Lastaspire petas Dion
preĝ' de l' patro en batal'...
"Baju, baju, bajuŝki...
Ho, fileto, dormu vi...
Kri' de l' morto, son' de l' plor'
flugu for de via kor'!
Baju... baju... bajuŝki...
dormu filo, dormu vi!"

Prude krude fremdaj homoj
venas el insid'...
Trompe rompe sangtriumfe
venkas la perfid'...
Kant' patrina plore sonas,
dormas filo en lulil'...
Tran pacon por li donas
sort' de l' patro en trankvil'...
"Baju, baju, bajuŝki...
Koro mia, filo, vi...
Anĝelete, pala roz'
dormu pace en ripoz'!
Baju... baju... bajuŝki
dormu nur eterne vi!..."



Por infanoj

Daŭriga rakonto el la rakonto`

MIRINDA RENKONTO`

Nuba decembra tago.Tero frostĝis .

Ja, estas malalta temperaturo – 2 gradoj. Se oni povas kredi al veterprognostoj ĉirkaŭ meze de la tago estos pli varme.

Nome ,ekstera temperaturo plialtiĝos kaj aperos suno. Ja , vintras!.

Subita bruo haltigis junulinan revadon .Sara saltis el la fotelo serĉante sian mobitelon.

``Saluton`` -respondis ŝi gaje al la bone konata voĉo.

``Ĉu vi baldaŭ venos? demandis ŝi la konatulon.

``Ne. Mi ne venos baldaŭ.....Mi tuj venas ĉe vi! Deŝlosigu vian dompordon!``

Sara estis surprizita . ``Kia bela surprizo!`` ekpensis ŝi malfermante vaste la dompordon.

Du junuloj forte brakumis unu la alian..

`` Diru surprizo!``-diris Pavlo al Sara.

``Bone ,mi diras``-

``SURPRIZO`` -diris Sara gaje . Tiam en la domon pave enpaŝis Petro kunportante mezgrandan skatolon samtempe oferante ĝin al Sara.

``Kio estas intere?``scivolis Sara .

``Malfermu la skatolon-``diris Pavlo.

Sara senpacience atendis . En la skatolo troviĝis la alia skatolo ,kaj remalfermante la duan kaj trian skatolon .Tiel okazis ĝiskiam oni ne malfernis la lastan skatoleton. En ĝi estis papero sur kiu skribis per grandaj literoj TESTUDO kaj KIEL TRAVIVI!

``Testudo``ekkriis Sara.

Ŝi ekkuris al brakumo de Pavlo.

``Kiel vi sciis!-embarase demandis ŝi la junulon.

Tiam enmiksĝis Petro klarigante al ŝi`:

-`Ja, mi flustris tion al oreloj de Pavlo .Li intencis donaci iun besteton al vi , kaj mi sciis vian sekreton , kiom vi ŝatis havigi testudon!``

Sara estis feliĉa. Ŝi ne estas sola . ŝi havas verajn geamikojn. La junuloj kaj iliaj amikoj alportis la testudon ekster la domon . Tie troviĝis bela ĝardeno kun altaj betuloj kaj unu granda kverko

kiu apenaŭ dividis proksiman arbaron de ilia domo. Tie sur la pado gaje saltetis la granda Mastro urso kun tri ursetoj kaj la Blanka leporeto Miko kaj ludanta hundeto Flavulo Zucko.

Petro estis vestita sporte sed Pavlo havis stelbrilan kravaton sub lia varma jakto. Ekrimarkante tion Sara okule kaj fingrosigne demandis ili

``Pardonu min, ĉu la surprizo ne finis ? Ĉu Pavlo, ankoraŭ havas ion por diri ! Mi vidis kravaton!``diris ŝi ride.

``Ne, respondis Pavlo. Fakte mi havas proponon . Antaŭ dek tagoj la lernantoj el nia najbara Lernejo petigis min ke ni akompanu ilin ĉe la urboplaco ĉi-vespere.Do, ili preparos belan aranĝon kadre de humana aktiveco por la malriĉaj infanoj. Kaj kiel vi scias venas Nova Jaro kaj mi en mia nomo promesis helpi ilin.``

Ĉu mi bone faris ? !`` Pavlo finis sian klarigon .

Sur lia vizaĝmieno flugadis ombretoj . Paŭzo finis ĉar ĉiuj ekridetis kriaĉante ``Jes ,jes Bonege !``

Posttagmeze aperis sunradioj. Ekstera temperaturo plialtiĝis je 8 gradoj! Ĉi-decembra prolongita seka senneĝa vetero taŭgas al ekskteraj laborantoj ,vilaĝanoj al senhejmuloj al hundoj vagantaj al malriĉuloj. Klimato tre ŝanĝiĝas. Aero en vesperaj horoj estas tre haladzita pro la fumotuboj kaj aperonta nebulo. Homoj tre malfacile spiras .Kvankam la urbo havas belegan verdan arbarparko la plimuto de arboj malsaniĝis . Feliĉe, homoj komprenis en la lasta minuto kiel estas grave savi tiun belan magian arbaron . Eĉ niaj amikoj plantis novajn arbojn kaj tiujn malsanulojn oni sanigis

— Daŭrigota —

Verkis Miriĉ Jadranka Zajeĉara Esperanto klubo
Serbio Decembre 2019



Koronviruso

Koronviruso

